# Mercervaroj

**Mercervaroj** estas la kompleto de produktaĵoj kiuj estas nemalhaveblaj por produktado de vestaĵoj kaj hejmaj tekstilaĵoj, pretigataj ĉu por privata konsumado ĉu por industria aplikado.



Merceraĵsekcio en granda magazeno

Mercervaroj havas du grupojn: la „molaj” mercervaroj estas tekstilaĵoj, la materialo de la „malmolaj” mercervaroj estas ligno, metalo aŭ plasto.

## Specioj de la mercervaroj


Tablo de mercervarvendisto en foirejo

### Molaj mercervaroj

- kudrofadenoj,
- fadenoj por mantrikado, mankroĉetado, brodado, memfaratai teksaĵoj (farataj per manteksilo),
- diversaj rubandoj,
- rimenoj,
- plektitaj kaj trikitaj ŝnuroj,
- puntoj kaj brodaĵoj,
- ornamantaj akcesoraĵoj (kvastoj, franĝoj, posamentoj ktp.),
- ŝultrokuŝenoj,
- ŝvitoensuĉantaj enmetaĵoj (en la akseloj de la vesto aŭ bluzo).

### Malmolaj mercervaroj

- kudriloj por mankudrado, mankroĉetado kaj maŝinkudrado,
- akcesoroj por fermi la vestaĵojn (butonoj, zipoj, lapfermiloj, prembutonoj, agrafoj, krampoj, bukoj),
- fingringoj,
- mantrikiloj,[noto 1] kroĉetiloj,
- rondkapaj pingloj, sekuraj pingloj.

La listo montras ke la amplekso de mercervaroj estas tre vasta.

**Elektado el molaj kaj malmolaj merceraĵoj**



Kudrofadenoj



Fadenoj pro manlaboro kaj kroĉetiloj



Plektita ŝnuro




Ŝulaĉo



Hungara kokardo el rubando kun koloraj strioj



Satenrubado



Elasta rubado



Plektita puntrubado



Antaŭprintitaj ŝtofpecoj por manbrodado



Kudrilo kun entredigita fadeno



Rondkapa pinglo



Sekura pinglo



Butonoj



Zipo



Kroĉila kaj banteta partoj de lapfermilo



Prembutono

## Fabrikado de mercervaroj

Por la fabrikado de kelkaj mercervaroj diversaj specialaj maŝinoj estas konstruitaj. La malmolaj mercervaroj – precipe tiuj kies materialo estas metalo aŭ plastiko – estas fabrikataj en grandaj amasoj per aŭtomataj maŝinoj. Molaj mercervaroj el tekstilaĵoj povas pretiĝi parte per la kutimaj tekstilmaŝinoj (ekz. kudrofadenoj, fadenoj per mantrikado kaj mankroĉetado), nur la teknologio adaptiĝas al la celo de uzo. Per fabrikado de rubandoj kaj rimenoj servas specialaj maŝinoj. Ornamaj rubandoj estas fabrikataj per specialaj rubandoteksmaŝinoj aŭ rubandokroĉetmaŝinoj. Multaj tipoj de plektitmaŝinoj estas evoluigitaj, inter ili la maŝinoj per plektitaj puntoj havas gravan rolon, ili havas tiel nomatan *jacquard*-aparaton, kiu movas la bobenojn laŭ la desegno. Inter rondtrikmaŝinoj la tipoj lavorantaj kun nur kelkaj (3–12) trikiloj – kaj veft- kaj varpsistemaj variantoj – servas la fabrikadon de ŝnuretoj. Per formi la ekstremaĵojn de la ŝulaĉo aŭtomata laŭcela maŝino estis konstruita. Industria fabrikado de brodaĵoj estas realigata nuntempe per elektronike regataj brodmaŝinoj kiuj povas fari ekstreme malsimplajn, multkolorajn desegnojn aŭtomate.

Teknika progreso estas kontinua ankaŭ en ĉi tiu fako. Precipe stimulas ĉi tiun progreson, ke la maŝinoj kiuj estis uzataj antaŭe per fabrikado de merceraĵoj, ofte estas uzeblaj per teknikaj novaĵoj nuntempe ankaŭ per fabrikado de teknikaj tekstilaĵoj.

## Noto

1. ↑ La nadloj per trikmaŝinoj ne estas objektoj de mercervaroj, ili estas apartenaĵoj de la trikmaŝinoj kaj ne estas aĉeteblaj de mercervarvendistoj.

## Fontoj


- Csentes J. (redaktoro): *Ruházati áruismeret II.* (Komercaĵoj per la fabrikado de vestaĵoj). Közazdasági és Jogi Könyvkiadó, Budapest, 1971
- Szentpéteri Gy.: *Textilipari ismeretek. Rövidáru, nemszőtt textíliák* (Tekstilaj sciaĵoj. Merceraĵoj, neteksitaj materialoj). Könnyűipari Műszaki Főiskola, Budapest, 1978
- Was ist Kurzwaren? (http://fragenantworten.info/Der-gewerblichen-Wirtschaft/Was-ist-Kurzwaren.php) Arkivigite je (https://web.archive.org/web/20130811153919/http://fragenantworten.info/Der-gewerblichen-Wirtschaft/Was-ist-Kurzwaren.php) 2013-08-11 per la retarkivo Wayback Machine
- M. kaj V. Verda: *Kudra kaj trika terminaro.* Esperanto Press, Oakville, Ontario, Kanado, 1960


Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Mercervaroj&oldid=8363582"